

La Espero

1974-3

Svenska Esperantotidningen

Fondita en 1913

SUKCESA KURSO EN KRAMFORS

La lingvo estas grava ilo per kiu unu nacio povas altrudi al aliaj sian kulturon kaj gajni ekonomian kaj politikan influon. La batalo por neŭtrala internacia lingvo estas tial ankaŭ batalo kontraŭ imperiismo kaj naciismo, kaj tio klarigas, kial la intereso por esperanto flanke de registaroj kaj aliaj influhavaj institucioj estas tiel malalta.

Tio estis la "ruĝa fadeno" de la parolantoj je kurso pri internaciaj demandoj, kiun aranĝis NBV (Studorganizaĵo de la Abstinencaj Asocioj) de Ådalen en Kramfors dum la lasta semajnfino de marto 1974. Iniciatis i. a. s-ano Sven Møllestad en Kramfors en kunlaboro kun la es-

perantistoj en Sundsvall kaj gvidis Göran Olsson, la studgvidanto distrikta de NBV en Ådalen. La prelegoj kaj diskutoj ĉefe temis pri la mondlingva problemoj kaj esperanto. En la kurso mem partoprenis ĉirkaŭ 20 personoj, kaj en la sabatvespera programo — kiu okazis en kunligo kun la jarkunveno de Föreningen Norden (asocio por kunlaboro inter la nordaj landoj) — duoble pli multaj.

Åke Blomberg, Lidköping, estis speciale invitita kiel ĉefpreleganto kaj parolis pri du ĉefaj temoj: "Ĉu ni havas mondlingvan problemon" kaj "La esperantomovado — unika kultura aperaĵo". La intenco estis per la unua temo vekti intereson pri la mondlingva problemoj entute — la parolanto opiniis, ke tiu problemoj

estas neglektita eĉ de la popolorganizaĵoj — kaj per la dua atentigi pri la fakto, ke esperanto ekzistas jam de preskaŭ 90 jaroj, ke ĝi estas ne nur projekto kaj absolute ne iu absurda ideo, sed ke kreskis kun la disvastigado de la lingvo interesa kaj multfaceta internacia kulturo, kiu per si mem meritas atenton kaj respekton. Åke Blomberg havis treege bonan helpon de antaŭ ĉio Yngve Forslund el Skellefteå, Torsten Farm kaj Ingrid Carlsson el Sundsvall, kiuj interŝanĝis kun la ĉefpreleganto je konvenaj okazoj kaj tiel variigis kaj plivigligis la diskutojn.

Je la sabatvespera kunestado post la mallonga jarkunveno de la loka "Föreningen Norden" Torsten Farm prezentis per elektitaj kolorbildoj rapsodion pri la lastjaraj Universallaj Kongresoj — inter kiuj kaj tiu de Tokio kaj tiu de Portland — kie li kaj lia edzino partoprenis, kaj tio evidente impresis al la ĉeestantoj. Juna fraŭlino kiu ne estas esperantisto — ankoraŭ — prezentis bildojn kaj parolis pri gejunula helpagado en Cejlono, kaj studgvidanto Göran Olsson rakontis same interese pri simila agado en Tunio.

En tiu aranĝo en Kramfors partoprenis kaj esperantistoj kaj eksteruloj, kaj fakte la temoj estis tiel elektitaj kaj prezentataj ke ili konvenis al ambaŭ grupoj. Ŝajnas ankaŭ, ke la partoprenantoj estis kontentaj, kaj mi pensas ĝuste tia kurso povus esti modelo por similaj aranĝoj aliloke. Povus esti, ke oni ne kolektas grandan nombron da personoj — neniu semajnfina kurso pri kiu ajn temo (kun maloftaj esceptoj) kolektas pli ol 20–30 partoprenantojn, almenaŭ ne ekster la grandaj urboj — sed almenaŭ iuj partoprenantoj havas tian pozicion en niaj popolorganizaĵoj, ke estas por ni grave informi ilin pri nia movado. Kaj informi objektive — sen plibeligo, pri la vera situacio de esperanto en la hodiaŭa mondo. Nur tiel ni gajnas respekton en rondoj ekster nia movado. Ili devas lerni pri niaj celoj kaj gisnunaj atingoj — vere ne malgrandaj — sed ankaŭ pri la fortoj kiuj kontraŭstaras al ni.

Honoron al la iniciatintoj en Kramfors. Bone raportis la du lokaj gazetoj, kun fotoj.

obo



Kelkaj el la kursanoj. Parolas Åke Blomberg, en la angulo studgvidanto Göran Olsson.

Dekpaĝa jarraporto

1973 estis bona agadjaro por SEF. Tion pruvas la 10-paĝa jarraporto, kiun la lokaj kluboj jam ricevis.

Plej imponas en ĝi la multaj paĝoj kun raporto pri loka agado. La lokaj kluboj daŭre restas la ĉefa bazo de la esperanto-laboro. Oni raportas pri prelegoj kaj kursoj, ekspozicioj kaj disdonado de flugfolioj, pri kontaktoj kun gazetoj ktp. La listo estas longa, eĉ malgraŭ tio, ke la jarraporto prezentas la agadon de nur duono de la aktivaj kluboj.

Cetere gravis dum 1973 tri vizitoj el eksterlando: tiuj de pastro Ciccanti, de Jean Guillaume kaj de Justin Minani. Ili kaŭzis multe da kontaktoj kun neesperantistoj kaj multe da artikoloj en la gazetaro.

La informa materialo ankoraŭ pliboniĝis kaj plimultiĝis. Aperis du tute novaj broŝuroj, "Behövs det fler språk när det redan finns tretusen?" por interesuloj, kiuj deziras pliajn informojn pri esperanto, kaj "Bland vill man kunna tala med alla människor", kiu turnas sin al lernejoj. La enhavo de tiu ĉi broŝuro aperis ankaŭ kiel serio de 7 afiŝoj, uzeblaj por ekspozicioj.

La faldfolio "Valet av internationellt språk är en fråga om jämlikhet" ricevis novan aspekton kaj estis presita en pluaĵ 10 000 ekzempleroj.

Okaze de la 25-jara jubileo de la deklaro pri la homaj rajtoj SEF eldonis presaĵon "25 år", en kiu ĝi atentigas pri la lingva kaj kultura diskriminacio. La presaĵo estis dissendita al ĉiuj membroj, al la parlamentanoj, al ĉiuj ĵurnaloj kaj aro da aliaj gazetoj, kaj al multaj politikaj, sindikataj, religiaj, pacistaj kaj idealismaj organizaĵoj.

Fine de 1973 SEF prezentis al la kluboj informpakaĵon, en kiu prezentigis mallonge la havebla informmaterialo de SEF kaj ideoj por ĝia uzo. En ĝi estis prezentitaj ankaŭ kvar novaj afiŝetoj kaj ses novaj flugfolioj por baza informado en granda skalo. La kluboj jam mendis pli ol 35 000 da tiaj flugfolioj en la unua kvarono de 1974.

Franko Luin

Lasta dato por manuskriptoj por la sekvonta numero de La Espero: 30 junio.

FÖRLAGETS VERKSAMHET

Manuskriptet till supplementet till Svensk-Esperantisk ordbok beräknas vara klart inom den närmaste tiden och utgivning av ny upplaga av ordboken jämte supplement kommer därefter enarast att påbörjas. Denna upplaga av ordboken kommer att ge en respittid, så att arbetet på Ebbe Vilborgs manuskript till en helt ny-skriven ordbok kan avslutas utan hast och problemen med dennas finansiering kan lösas.

Omsättningen har uppgått till 26.736 kr., vilket utgör en ökning.

Enär vinsten är för liten att med-

ge utdelning, föreslår styrelsen att den föres i ny räkning.

Förlagets expedition har under året föreståtts av fru Anna-Greta Ströme.

Styrelsen har under året hållit två protokollförda sammanträden. Den har bestått av Hjalmar Andersson, Gertrud Lund, Sven Sjöblom, Karin Strandberg och Per Törnegrén med Sven Sjöblom som ordförande. Styrelsesuppleanter har varit Bertil Nilsson och Nils Olsson. I tur att avgå är Hjalmar Andersson, Gertrud Lund, Per Törnegrén och Nils Olsson.

BALANSRÄKNING

Tillgångar:	1973-01-01	1973-12-31
Omsättningstillgångar		
Kassa	0	0
Postgiro	3.773:20	7.820:93
Bank	41.691:80	43.924:25
Kundfordringar	1.503:82	813:70
Varulager	8.017:65	4.839:52
Kommissionslager	269:40	328:40
Anläggningstillgångar		
Andelar i HSB	1.495:70	1.495:70
Inventarier	0	0
Summa	56.751:57	59.222:50
Skulder och eget kapital		
Skulder		
Långfristiga skulder	6.285:—	6.275:—
Diverse leverantörer	9.220:10	8.515:10
Skatter och avgifter	686:—	2.002:—
Eget kapital		
Andelskapital	32.740:—	32.740:—
Reservfond	6.509:60	6.509:60
Balanserad vinst	1.090:25	1.310:87
Årets resultat	+220:62	+1.869:93
Summa	56.751:57	59.222:50

VINST- OCH FÖRLUSTRÄKNING FÖR ÅR 1973

Intäkter		Kostnader	
Bruttovinst	14.093:48	Omkostnader ..	14.206:—
Ränteeintäkter ..	1.982:45	Årets vinst	1.869:93
Summa	16.075:93	Summa	16.075:93

Malmö den 26 mars 1974.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO U. P. A.

Hjalmar Andersson Gertrud Lund Sven Sjöblom
Karin Strandberg Per Törnegrén

I serien "Värt att veta" i P 1 berättar docent Ebbe Vilborg, Göteborg, om

"ETT SPRÅK FÖR EN VÄRLD".

P 1 söndagen den 2 juni (pingstdagen) och söndagen den 9 juni
omkring kl. 15.00 ("Värt att veta" brukar börja kl. 15.15).

Låt Sveriges Radio få veta att du lyssnat!

Federaciaj kunvenoj

En "British Esperantist" de pasinta oktobro levigis voĉo de David Hill, pri la ŝajna rutineco de federaciaj renkontiĝoj.

La tono estas amuza, sed la kontestado meritas mediton, ĉar kelkaj el la rimarkoj validas ankaŭ por aliaj landoj.


"Kion celas, ekzemple, federaciaj konferencoj? Ĝam dum dektri jaroj en pli ol unu regiono mi de tempo al tempo suferis tiajn okazojn! Ĝam mi bone konas tiujn plensunajn posttagmezojn pasigitajn en malbelaj supraj ĉambroj de provincaj metodistaj haloj, tiujn senfinajn aferkunvenojn, dum kiuj la du-tri unuagradaj esperantistoj parolas kaj parolas kaj parolas, dum kiuj ni ricevas raportojn de prezidanto, sekretario, vicsekretario, kasiso, federacia librobudisto, redaktoro de la federacia bulteno, reprezentanto al la konsilantaro de BEA, reprezentantoj de ĉiuj lokaj grupoj, vizitantoj de aliaj federacioj, kaj ceteraj, preskaŭ senfine; tiujn te-paŭzojn, kiam ĉiuj elsakigas siajn proprajn — nun bakitajn — sandviĉojn kaj ĉirkaŭpromenas manĝante, por pli efike krokodili en angulo nerimarkite de la unuagraduloj; tiujn postajn paroladojn kun diapozitivaj pri 'Mia ferio en... lando'; tiujn komunajn kantadojn de skolttendejaj kantetoj; tiun finan kantadon (dum ni staras, kompreneble) de 'La Espero'.

Jes, ni ĉiuj ja bone konas ĉion tion. Sed kion vere signifas tiaj kunvenoj? Kio estas ilia celo? Se ili celas la edukon de la esperantistaro, ili videble ne estas efika rimedo, ĉar ilia kultura enhavo estas preskaŭ nula. Se ili celas propagandi, ili same maltrafas, ĉar ili ne atingas la publikon kaj ili ne taŭge preparas la esperantistojn por posta eliro al la publiko. (Kaj se vi povus doni al neesperantista amiko fidelan tradukon de la enhavo de tipa esperantista kunveno, ĉu vi vere fierus pri ĝi kiel bona reklamo?)"

Unu el niaj legantoj atentigis nin pri la ĉi-supra artikoleto, kiun li trovis represita en Heroldo. Li rekomendis al ni publikigi ĝin en la sveda lingvo. Tion ni tamen ne faras laŭ nia principo ke tiaj kritikoj al cirkonstancoj en la esperantomovado, kiuj povus malfavore efiki al neesperantistoj, estu en esperanto.

Cetere ni volas aldoni, ke ni devas akcepti la fakton, ke en nia esperantomovado troviĝas multaj personoj, kiuj havas relative malgrandan intereson por nia movado kaj nia lingvo. Sed ili estas pagantaj membroj kaj ili estas parto de niaj organizaĵoj, kiujn ni ne rajtas neglekti. Sed kompreneble ni povas ĉiam diskuti pri la laborformoj je niaj federaciaj kunvenoj kaj provi ilin plibonigi.

VÄSTERÅS



En lernejo en Västerås Wim Posthuma rakontis pri esperanto por infanoj de la 4-a klaso (la klaso de lia filino). Grandan intereson montris ankaŭ la instruistino de tiu klaso.

LA SUDA DISTRIKTO

La suda distrikto de Sveda Esperanto-Federacio havis sian jarkunvenon la 17-an de Marto en Hotelo Savoy, Helsingborg.

La prez. de la klubo Inga Magnusson kaj la distr. prez. Olle Olsson bonvensalutis ĉirkaŭ 65 ĉeestantojn.

Ni komencis per kantado de la himno. Poste sekvis funebra parolo pri membro kiu forpasis.

Post ordinaraĵ pritraktoj oni parolis pri distrikta semajnfina kurso, aranĝota supozeble venontan aŭtonon. Antaŭ kaj post la kunsido S:roj Ture West kaj Erik Trygg regalis nin per violona muziko.

Posttagmeze ni aŭskultis prelegon de S:ro Gustav Kühlmann, Kopenhago, pri "Esperanto en la servo de la reklamo" bonege prezentita de vere lerta preleganto. Malmö estos la loko por la jarkunveno venontan jaron.

8 kontentaj Halmstadanoj

GÖTEBORG

Esperantoalianceno (La Esperanto-Alianco) inaŭguris sian novan ejon en Magasinsgatan 23 dimanĉe la 24/3. Gunnar Särholm, Falköping, rakontis pri "Konstruo de fervoja tunelo tra la Alpoj" kaj Sven Hallberg, Alingsås, ludis per fortepiano "Nordlandajn tonojn". La pseŭdonimo estis ankaŭ invitita sed ekhavis — mi ne scias ĉu jam por la tria aŭ kvara fojo — malhelpon lastminute. Espe- reble je alia okazo mi havos denove eblecon gastigi en la agrabla medio de la esperantistoj en Gotenburgo. **B.**

NI GRATULAS AL

Einar Dahl, Uddevalla, estis 70-jara 29/2. Eksparlamentano tro konata en la esperantistaro por bezoni plian prezentadon tie ĉi.

L. Friis, Åbyhøj, Danlando, 70-jara 23/1. Gvidanto de Dansk Esperantoforlag kaj de la Internaciaj FERIAJ Esperanto-kursoj en Helsingor.

Oskar Svantesson, Göteborg, 70-jara 2/6. Eldonanto de **Mundo**, pli frue Letero, iama redaktoro de La Espero, ktp., ktp. Esperantigis en 1924, sekve: duobla jubileo!

Björn Collinder, Uppsala, 80-jara 22/7. Emerita profesoro (finnougraj lingvoj). Tre konata kaj sperta lingvisto ankaŭ pri esperanto li multfoje defendis nian lingvon publike, i. a. en la Sveda Radio kaj eĉ en televido.

Curt Alf, Norrköping, 60-jara 26/1, aktivas en multaj kampoj, i. a. tre lerta prezidanto je kelkaj el la jarkongresoj de SEF.

Nils Erik Kristoffersson, iama prezidanto de SEJU kaj ankoraŭ fidela esperantisto, kaj **Kerstin Svarén**, kiuj geedziĝis en Täby la 6/4.

Pakajo pri informado

La ĉefaj taskoj de la esperantistoj estas tri:

1. informi pri esperanto
2. instrui esperanton
3. uzi esperanton

La taskoj numeroj 2 kaj 3 estas tute dependaj de la tasko numero 1. Se ni ne informas pri esperanto, ni ankaŭ ne povas kalkuli pri aliaj aktivecoj.

Informado ne estas facila tasko. Sed oni povas faciligi ĝin per taŭgaj helpiloj.

**VARSÅGOD!
HÄR KOMMER ETT PAKET
FULLT AV NYTTIGA
ÖVERRASKNINGAR.**



Pakajo

Sveda Esperanto-Federacio (SEF) ĵus produktis kajeron kun la titolo "Varsågöd! Här kommer ett paket fullt av nyttiga överraskningar" (Jen! Tie ĉi venas pakajo plena de utilaj surprizoj).

La pakajo havas duoblan celon: Unue, ĝi povas funkcii kiel memorlisto, kiam klubo planas sian informadon. Kaj due, ĝi povas esti elirpunkto kiam la klubo volas eltrovi novajn manierojn por la informado.

La kajero konsistas el listo pri ideoj de diversaj manieroj de informado, priskriboj pri la informmaterialo de SEF, kaj laste mendilo.

Idelisto: komencu facile!

Ne estas tre malfacile meti afiŝetojn sur afiŝtabulojn. Estas multe pli malfacile igi grandan gazeton skribi artikolon pri esperanto-aranĝo. Sed estas multe pli bone decidi pri afiŝetado, kaj fakte fari tion, ol provi ion komplikitan kio fariĝas nenio.

La proponoj en la idelisto estas ordigitaj laŭ facileco. Se klubo deziras fari ekspozicion pri esperanto, ĝi povas fari tion tre facile (SEF havas ekspozicion kiu konsistas el nur afiŝoj), aŭ komplikite (la klubo mem konstruas ekspozicion). Simile pri informvespero, aŭ pri kurso, aŭ pri daŭra kontakto kun interesitoj.

Informmaterialo

La kajero sisteme montras la informmaterialojn de SEF: broŝuroj, pretaj prelegtekstoj, afiŝetoj, flugfolioj, ekspozicio el 7 afiŝoj, la informrevuo Esperantonytt, proponon pri en-havo de koverto por interesitoj.

La broŝuroj kaj flugfolioj havas kuponon, per kiu interesito en komforta maniero povas kontaktiĝi kun la klubo aŭ rekte kun SEF. Ankaŭ se multaj deziras nur informojn, kaj ne deziras lerni esperanton, tio ja jam estas pli ol nenio.

La kajero estas havebla

La kajero estas svedlingva. Ĝi estas jam dissendita al ĉiuj svedaj kluboj. Sed ĝi ankaŭ estas havebla por ĉiuj membroj kiuj interesigis pri ĝi. Adreso: SEF, Fack, 122 04 Stockholm-Enskede.

Por la jarkongreso en Borlänge ĉi-jare ni planas dediĉi kelkajn horojn al trarigardo de la materialo.

Ulla kaj Franko Luin

Kontaktoj Svedio Aŭstrio

(okaze de la ĉiujaraj svedaj semajnoj en Vieno)

Per speciale svedaj aranĝoj ĉi-tiuj semajnoj distingiĝas en la muzikkultura vivo de Vieno. Svedaj muzikistoj venis tiucele al nia metropolo, por koncertante plifortigi la spiritan ligan inter sia patrio, alte en la Eŭropa Nordo, kaj la nia, situanta — geografie kaj spirite — en la koro de la kontinento. Interligas la du landojn, ekde preskaŭ du jardekoj ankaŭ komuna aspekto de politika sistemo, nome konscie pozitiva neŭtraleco.

Aŭstrio fine ekkonis, ke tiu nepre benoplena sinkompreno, kiun Svedio jam delonge adoptis, estas ankaŭ ĝia, de la Sorto mem por ĝi kvazaŭ antaŭdestinita nova tasko. Same kiel por Svedio, la tempoj de ŝajne glora grandpolitiko, de kulpe intensiva aŭ de plimalpli kontraŭvola partopreno en sangaj militoj estas nun ankaŭ por Aŭstrio espereble definitive pasintaj.

Antaŭ pli ol tri jarcentoj, kiam furiozis en Centra Eŭropo la fifama Tridek-jara Milito, la rilatoj inter Svedio kaj Aŭstrio ne estis tiel harmoniaj kiel hodiaŭ. La sveda armeo, servanta sub la reĝo Gustav Adolf la entuziasmigan ideon de la eklezia Reformacio, sed post la morto de la heroo reĝo pure potencavidajn, landaneksajn celojn, tiu sveda armeo invadis kaj dezertigis ripete ankaŭ aŭstriajn provincojn, du fojojn minacante eĉ Vienon mem. La svedaj sol-

datoj — kiel ankaŭ praktike ĉiuj alianciaj — estis timataj pro sia krueleco kontraŭ la paceme laboranta kamparana kaj burĝa popolo. Dum longa tempo ankoraŭ oni memoris ilin, rakontante tremige abomenajn epizodojn.

Sed, feliĉe, tiuj tempoj forpasis, alvenis pli pacaj — almenaŭ en la rilatoj inter Svedio kaj Aŭstrio. En la lasta kvarono de tiu sama jarcento okazis rimarkinda, pure kultura intertuŝo: en Romo vivis dum kelkaj jaroj samtempe la eksreĝino Kristina, la artojn kaj sciencojn akcelanta, de la patra protestantismo al fervora katolicismo konvertiĝinta, iom strangmensa virino, kaj, en kontakto ankaŭ kun ŝi, la granda aŭstra (pli precize: stiria) arkitekto Fischer de Erlach, denaska katoliko, poste en la servo de la varbanta ankaŭ per arkitektura pompo — katolika Kontraŭreformacio.

Pasis du jarcentoj, antaŭ ol okazis alia — eĉ multe pli rimarkinda — kontakto inter personoj de sveda nacieco je unu flanko kaj de aŭstria je la alia. Alfred Nobel influis per siaj ideoj nian protagonistinon por la mondopaco: Bertha de Suttner. Sed ankaŭ ŝi influis lin. Ke al la jam fiksita Nobel-Premioj por kemio, fiziko, medicino kaj literaturo estis aldonata kvina premio, nome por klopodoj pri la paco, tio estis tute ŝia, konvinke instiga, merito. Ŝi ne antaŭsciis ke ŝi mem ricevos tiun premion kiel unua Aŭstrianino en la sama jaro 1905, en kiu okazis la packongreso en Luzern, la Unua Universala Kongreso de Esperanto en Boulogne-sur-Mer, kaj en kiu la gazetlega publiko multe interesigis pri la konflikto inter Svedio kaj Norvegio, konflikto kiu jam preskaŭ milite minacis, sed bonŝance finis per sensanga disigo de la antaŭa, kontraŭnatura kunligiteco.

Tre humanaj, vere homamaj interrilatoj estigis post la Unua Mondmilito, kiam Svedio elstare partoprenis kune kun Norvegio, Danlando, Svisio, Nederlando kaj aliaj en la ampleksa helpagado por la malsatantaj, pro malvarmo kaj ĉiuspeca mizero terure suferantaj aŭstriaĵoj — antaŭ ĉio vienaj — infanoj. Multaj el la nun jam geava generacio dankeme memoras la ekscitan vojaĝon al — kaj fabelosimilan vivon ĉe — iliaj kvazaŭ-adoptaj "gepatroj" en la norda lando. La dankema Komunumo de Vieno rebaptis unu el siaj plej trafikoplenaj placoj, nomante ĝin "Schweden-Placo". Kaj tiel la placo nomiĝas ankoraŭ, des pli ĉar sveda helpo malavaris ankaŭ post la Dua Mondmilito, dum jaroj de eĉ pli granda mizero.

Ni fine menciu, ke "Sveda-Aŭstra Societo" aparte sinokupas pri konservado, pliampleksigo kaj pliprofundigo, de iuj kaj simile pozitivaj memoroj, informoj, kontaktoj kaj reciprokaj instigoj inter ambaŭ landoj kaj popoloj.

Dr. Karl Beckmann, Wien

AMNESTIO INTERNACIA

"Kiel supozeble vi jam scias, Amnestio Internacia estas organizo laboranta por la realigo de la homaj rajtoj konforme al la deklaro de la Unuiĝintaj Nacioj. Ĉiu grupo en nia organizo laboras por tri kaptitoj pro opinio, en tri malsamaj partoj de la mondo. Unu el la oftaj problemoj, kiujn ni renkontadas, estas la malfacilaĵo de diversaj naciaj lingvoj."

Tiel, proksimume, komenciĝas letero, kiu antaŭ nelonge venis al la sekretario de Sveda Esperanto-Federacio. Subskribis ĝin Bo Lindblom, la nove elektita prezidanto de la sveda sekcio de Amnestio Internacia.

Ne apartenas al ĉiutagaĵoj, ke grava organizaĵo turnas sin al SEF serĉante kunlaboron. Ankoraŭ pli malofte okazas ke ĝi faras tion en — esperanto!


KIO ESTAS AMNESTIO INTERNACIA?

Amnestio Internacia laboras por la realigo de la homaj rajtoj. Ĝi elektis kiel specialan taskon helpi al homoj, kiuj estas en malliberejo pro siaj politikaj ideoj. La Deklaracio pri la homaj rajtoj deklaras la rajton de ĉiuj havi la politikan aŭ religian ideon, kiun ili volas. En multaj partoj de la mondo oni ignoras tiujn ĉi rajtojn. Oni malliberigas homojn aŭ persekutas ilin. Multajn oni persekutas pro ilia aparteno al iu etna grupo, pro ilia haŭtkoloro aŭ lingvo. Amnestio Internacia laboras kontraŭ tiaj persekutoj, kie ajn ili okazu.

La Amnestio-movado estas relative nova. Ĝi startis en 1961 kiel kampanjo, kiu daŭru ĉirkaŭ duonan jaron, por liberigo de politikaj aŭ religiaj malliberuloj. Montrigis, ke la tasko estis tro granda por tiel mallonga tempo. Tial Amnestio Internacia fondiĝis en julio 1961. Hodiaŭ ekzistas ĉirkaŭ 30 naciaj Amnestio-sekcioj kun ĉirkaŭ 1000 aktivaj laborgrupoj. (La sveda sekcio havas proksimume 250 laborgrupojn kaj 6000 membrojn.) La organizaĵo estas en konsultaj rilatoj kun pluraj UN-organoj (UNESCO, ECOSOC) kaj la Eŭropa Konsilantaro.

POLITIKE NEŬTRALA MOVADO

Amnestio Internacia estas, same kiel la esperantomovado, politike, religie kaj ekonomie neŭtrala. Ĝi laboras por politikaj malliberuloj, sendepende de kie ili estas. Pro sia ideologia neŭtraleco Amnestio Internacia povas atingi rezultojn ankaŭ en landoj, kie aliaj organizaĵoj ne po-



vas agi. La organizo nome ne interesiĝas pri la politika sistemo de la landoj.

KIEL ĜI LABORAS?

La bazan laboron de Amnestio faras la lokaj laborgrupoj. Ĉiu grupo "adoptas" po tri malliberulojn kaj laboras por ilia liberigo. Ili devas informi pri "siaj" malliberuloj, preni kontakton kun la familianoj — eventuale eĉ helpi ilin —, aranĝi helpon de advokato ktp. La helpo do povas esti morala (estas por la malliberulo grave scii, ke iuj pensas kaj zorgas pri li) aŭ ekonomia.

KION POVAS FARI LA ESPERANTISTOJ?

Sed reen al la ricevita letero. Bo Lindblom skribas: "Apelacioj kaj demandoj al la aŭtoritatoj povas kutime esti skribataj en iu ajn el la grandaj lingvoj, sed la malliberulo, lia familio kaj la advokato oftege komprenas nur la nacian lingvon.

En tio ĉi esperantistoj de la tuta mondo povus helpi nin, partoprenante tiel en la laboro por la homaj

rajtoj. Viaj personaj konatuloj en multaj landoj povus, ekzemple, serĉi familianojn, al kiuj ni ne havas adresojn, eble viziti ilin por vidi, kion ili bezonas, kaj por klarigi, kion Amnestio Internacia povas fari.

Memkompreneble partopreno en nia laboro por la homaj rajtoj ne devas meti esperantistojn en ian ajn konflikton kun la aŭtoritatoj de ilia lando, sed devas nur enteni asiston homan, kiun la aŭtoritatoj povas akcepti."

Bo Lindblom ankaŭ aldonas, ke laŭ lia propra sperto de esperanto, multaj membroj de la lokaj Amnestio-grupoj post mallonga studado kapablos skribi esperanton kompreneble, kun helpo de vortaro kaj ŝlosilo.

SEF kompreneble bonvenigas la iniciaton de la sveda sekcio de Amnestio Internacia kaj estas certa, ke la ideo de ĝia prezidanto montrigos prava. Se vi emas kunhelpi en tiu ĉi nova kaj grava projekto, turnu vin al SEF, Fack, S-122 04 Stockholm-Enskede.

Franko Luin

KIEL INTERESIGI PARTIOJN

La itala socialdemokrata partio (Partio Socialista Democratico Italiano) oficiale proponis al la socialista internacio la adopton de esperanto kiel unuiga lingvo por la socialistaj partioj. Ni ricevis presitan broŝuron, kiu en la itala kaj en esperanto resumas la motivojn por la propono.

Eĉ se la socialista internacio ne akceptos la italan proponon, ni opinias, ke la propono mem estas jam grava progreso. S-ano Alberto Monabene sendis leteron, en kiu li sufiĉe detale klarigas kiel li agis por igi la partion prezenti tiun proponon. Ni pensas, ke tiu letero estas tiel interesa, ke ni decidis publikigi ĝin ĉi sube.

En septembro 1976 la partio organizos en Romo la unuan kongreson de la esperantistaj socialistoj.

Komprenoble tia agado, se efika, devos en iu aŭ alia maniero okazi ankaŭ en aliaj politikaj partioj.

Red.

Kiel jam konate, Itala Socialdemokrata Partio (PSDI) proponis al la Socialisma Internacio la adopton de Esperanto kiel unuiga lingvo por la socialistaj partioj kaj la mondo de la laboro.

Tiu ĉi fakto havas egan gravecon ĉar E. povas venki sian batalon en la mondo nur se registaroj kaj parlamentoj decidus enkonduki ĝian instruadon en la lernejojn kaj adopti ĝin en la internaciaj rilatoj.

Sed registaroj kaj parlamentoj, en preskaŭ ĉiuj ŝtatoj en la mondo, konsistas el homoj, kiuj estas tie por realigi la programon de la respektivaj partioj. Do: se la partioj interesigas pri E., parlamentanoj kaj registaroj agados favore al E.; se la partioj, kontraŭe, ne interesigas pri ĝi, parlamentanoj kaj registaroj neniam prenos konkretan iniciaton favore al ĝi.

Estas klare, tamen, ke tre malfacile partio povos vere interesigi pri E., (kiu havas signifon nur se

ĝi estas uzata internacie) se antaŭe ĝi ne akordigis almenaŭ kun 2-3 partioj de aliaj ŝtatoj, cele ĝin enkonduki samtempe en la respektivajn lernejojn kaj uzi ĝin en la reciprokaj internaciaj rilatoj.

Oni prenas similajn akordojn en la kunsidoj de la diversaj Internacioj (Socialisma, liberala, demokrata-kristana, k. t. p.) se iu partio proponas tion, kaj la iniciato de PSDI estas grava ĉar, unuafoje, esperigas nin je la ebleco de sekvanta interkonsento de la registaroj.

Nun estas necese bone kompreni, ke partioj interesigas al la solvo de speciala problemo nur se interne de ili estas membroj, kiuj premas por ke la partioj interesigu al tiu **problemo**. Rilate al E., estas necese, ke interne de **iu ajn** partio estu unu aŭ pli da esperantistoj, kiuj proponu al sia partio interesigi pri la adopto de E. kiel lingvo por internaciaj rilatoj.

Sed malmultaj personoj jam sufiĉas, kiel montras la fakto, ke la Itala Socialdemokrata Partio prenis la faman iniciaton pro la premo de... nur **unu** persono! Pro tio mi opinias utile klarigi detale, kiel mi agadis, tiel ke ankaŭ aliaj povu atingi, en aliaj landoj, en la respektivaj partioj, la samajn rezultojn.

Do, mi devis labori, kiel socialisto, interne de mia partio. Komence, post multaj klopodoj, mi sukcesis aranĝi esperantan kurson en la sekcio de la partio en mia kvartalo (kelkaj partianoj sekvis ĝin).

Pro diversaj kaŭzoj la kurso ne estis fruktodona, tamen, skribante pri ĝi, mi povis pretigi mian unuan artikolon pri E., kiun mi sukcesis publikigi en la gazeto de la partio, kvankam la direktoro de la ĵurnalo, komence, tute ne volis publikigi ĝin ĉar li opiniis, ke Esperanto estas stultajo.

Post la publikigo de la unua artikolo, mi organizis sendadon de leteroj de diversaj urboj de Italio por gratuli la ĵurnalon pro tiu artikolo. Sep leteroj aperis... Post tiu artefarita sukceso, mi tre facile povis publikigi aliajn kvin artikolojn en la sama ĵurnalo.

Post tiu serio de artikoloj mi opiniis, ke la tereno estas matura por stimuli reagojn. Kun la helpo de la esperantistoj de diversaj italaj urboj, mi klopodis kontakti kelkajn gravulojn de la provincaj federacioj de mia partio, kaj, fine, mi sukcesis kontakti la estron de la provinca federacio de Trento (km 700 de Romo). Mi iris al Trento kaj mi vizitis tiun estron kune kun delegacio de lokaj esperantistoj. Mi montris la serion de la artikoloj publikigitaj en **nia** ĵurnalo kaj mi demandis lian opinion. Li respondis, ke, verdire, li tute ne legis ilin antaŭe, sed promesis fari tion, atente, dum la sekvantaj tagoj.

Je la fino de la interparolo mi donis al li jam pretigitan rezolucion

SOMMARLEKTYR

TRANS LA FABELOCEANO

Orig. av F. Szilagy. Hans sagor har en egen speciell stämning. Boken utkom 1931 och blev en succé som snart såldes slut. Äntligen har nu en nytryckning gett oss senare Esperantister nöjet att lära känna den. Inb., 136 sidor, måga illustrationer.

Pris inkl. moms 22: 75

PATROJ KAJ FILOJ

Känd rysk roman av I. Turgenjev, översatt av K. Bein (KABE). Konflikten mellan två generationer och livet bland bönder och arbetare i det gamla Ryssland är mäterligt skildrat.

215 sidor. Pris inkl. moms 25: —

AV ESPERANTOFÖRLAGETS EGNA UTGÄVOR:

NORMANDEJ RAKONTOJ inkl. moms. inb. 25: —

JAROJ SUR TERO inkl. moms. inb. 18: 20, häft. 13: 65

TRA LANDO DE INDIANOJ inkl. moms. inb. 34: 10, häft. 27: 30

MALSATA STONO inkl. moms. inb. 22: 75

ESPERANTOFÖRLAGET

Fack, 200 42 Malmö 7 - Postgiro 578-5

petante lin voĉdonigi ĝin fare de la membraro de lia federacio (se li estus opiniinta, post la legado de la artikoloj, ke ilia enhavo estas prava). Poste mi reforveturis al Romo.

La artikoloj plaĉis al li, kaj li prezentis kaj voĉdonigis mian rezolucion al la junulara provinca komisiono. Poste, li tuj sendis la voĉdonitan rezolucion (kiu, interalie, proponas la adopton de E. kiel internacia lingvo de la socialistoj) al la direkcio de la partio.

La sekretario de la partio, tuj post la ricevo de la rezolucio, sendigis ĝin al la Socialisma Internacio por la diskuto. Post la jesa respondo de Hans Janitschek (ĝenerala sekretario de la Internacio) mi fariĝis, kompreneble, iom pli grava en la medio de mia partio, kaj, kiam mi proponis la dissendon de cirkulero al ĉiuj socialistaj partioj por klarigi la celon de tiu iniciato, mia propono estis akceptita. Mi mem pretigis la tekston, en itala lingvo kaj Esperanto.

Tuj poste mi ankoraŭ proponis, ke okaze de miaj vojaĝoj eksterlanden al kongresoj esperantistaj, oni sendu min paroli, kiel "ambasadoron", al la estroj de la diversaj partioj. Oni akceptis ankaŭ ĉi tiun proponon. Kiel oficiala reprezentanto de la Itala Socialdemokrata Partio mi kontaktis en Kopenhago estrarancn de la dana; en Berno, la sekretarion de la svisa; en Hago, la sekretarion de la nederlanda; en Vieno, estrarancn de la aŭstria. Tre bonaj premisoj por kromaj agadoj estis tiel starigitaj.

Estas facile kompreni, el tiu ĉi raporto, ke la bazo de mia partio ankoraŭ preskaŭ tute ne scias pri E., kaj ne interesigas pri la lingva problemo. Por veki ĝian intereson mi petis kaj atingis, ke la sekretario de la sekcio de mia kvartalo starigu prelegon kaj debaton pri E., fare de deputito Franco Nicolazzi, unua sub-

skribinto de la leĝpropono, kiu antaŭvidas la instruadon de E. en la italaj lernejoj.

Mi krome petis kaj atingis, ke oni pretigu la tekston de la cirkulero (adresota al la membroj de la sekcio) en la itala kaj Esperanto, kaj oni sendu ĝin, por informo, ankaŭ al la aliaj sekcioj de la provinco de Romo (preskaŭ 80), al la parlamentanoj kaj al aliaj gravuloj. La prelego okazis la 21-an de novembro kun granda sukceso. Mi invitis al la asembleo ĵurnaliston de presagentejo, kiu sendis raporton al la tuta itala presaro.

De tio, certe, sekvos novaj iniciatoj kaj gravaj rezultoj; jam okazis alia kunveno pri la sama temo en alia sekcio de Romo.

Ĉio, ĝis nun estas farita en malpli ol 2 jaroj.

Do: la komenco de la agado devas esti la publikigo de serio de artikoloj en la gazeto de la partio ĉar nur post la publikigo estas eble havi aŭ stimuli reagojn de la bazo. **Kaj la estroj agas nur se la bazo oficiale, instigas.**

Kompreneble, la peto pri la publikigo devas esti farita de membro de la partio (pli bone: grupo da membroj, kiuj iras kontakti persone la direktoron de la gazeto kaj donas al li jam pretigitan serion da artikoloj).

Mi tutkore kaj varme invitas ĉiujn laboremajn partianojn, ĉie en la mondo, sekvi ĉi tiun fruktodonan vojon. La serio de la italaj artikoloj, tradukitaj en Esperanto, estas disponeblaj senpage. Ili povas utili speciale al la eŭropanoj, post la necesaj modifoj, kiel skizo por pretigi nacilingvajn artikolojn.

Oni povas ilin peti ankaŭ de Radio Roma — Esperanto, Casella Postale 320, I-0100 Roma.

Alberto Monabene

BOKNYHETER

...KUN SIASPECA SPICO!

Orig. av Raymond Schwarz. Prosa och poesi i R. Schwarz välkända humoristiska stil. Boken innehåller dessutom 20 av hans artiklar under årens lopp i "Sennacieca Revuo" under titeln "Laŭ mia — ridpunkto".

Häftad, 215 sidor.

Pris inkl. moms 27: 85.

NI KAJ ĜI, ESEJOJ III (PRI RELEGIO KAJ ARTO)

Orig. av Gaston Waringhien. Lysande och mångsidig som alltid visar författaren även i sitt nya verk sina ingående kunskaper och konstkänedom.

Häftad, 344 sidor.

Pris inkl. moms 42: —.

LA ARBO DE LA SCIADO

Spansk roman av Pio Baroja, översatt av F. de Diego. Stor och mycket läst intellektuell roman om vetenskapliga problem, moral, livets mening; boken utgiven till minne av hans 100-årsfödelse.

Häftad, 231 sidor.

Pris inkl. moms 30: 75.

ESPERANTOFÖRLAGET

Fack, 200 42 Malmö 7

Postgiro 578-5

Konstrui per

YTONG®

estas konstrui

ekonomie

brulsekure

YTONGBOLAGEN

Hällabrottet

LERNU PER LA ERAROJ

"Mi konas li kiel energia kaj simpatia persono."

Ci tiu frazo lasas nin en dubo pri la persono kun la kvalitoj "energia k. simpatia": ĉu mi mem substrekas miajn energiecon k. simpatiecon, aŭ mi volas laŭdi tiujn bonajn ecojn ĉe alia persono.

Konas estas transitiva verbo, do la objekto devas havi akuzativan formon.

Kutime oni ne fanfaronas pri propra boneco, sed volas reliefigi tiun kvaliton ĉe alia homo.

Do la ĝusta frazo estas: Mi konas lin kiel energian kaj simpatian personon.

★

"Ni ĉiuj kunhelpas por ke la kursoj progresos." (?)

"Por ke" montras kutime celadon, intencon; tial ĝi sekvigas la u-modon. Do la ĝusta frazo: Ni ĉiuj kunhelpas, por ke la kursoj progresu.

T. M.

HELSINGÖR 1974

tuj antaŭ UK de Hamburgo

La internaciaj feriaj Esperanto-kursoj okazos 21.—27. de julio en La Internacia Altlernejo de Helsingör. Ni invitas vin veni por ĉeesti — kaj ĝui neforgeseblajn tagojn en internacia rondo dum la semajno tuj antaŭ la kongreso de Hamburgo.

Karavanvojaĝo el Helsingör al Hamburgo, kaj reen, estos aranĝata per trajno speciala por la kursanoj.

Programo senpage havebla ĉe

L. FRIIS


Ingemannsvej 9,
DK-8230 Åbyhøj, Danlando

VETERANOJ FORPASIĜIS

La Statprezidento de Aŭstrujo, Franz Jonas, mortis fine de aprilo. Kiel la plej multaj el niaj legantoj scias, Franz Jonas estis esperantisto, kaj salutis en esperanto oficiale la Universalan Kongreson en Vieno en 1970.

Axel Ahlqvist, Skånes Värnsjö, mortis la 3-an de aprilo, 69-jara. Dum 37 jaroj li fidele agadis por Esperanto. Dum multaj jaroj li apartenis al la esperanto asocio de Helsingborg. Ni kun danko memoras lin.

Ere—parkere



Korespondas

Kun sveda esperantisto. **Viola Irene** 2132 GÖD-FELSO, Sallai Imre U. 44, Hungarujo. 30-jara. Intereso: Vojaĝoj, fremdaj lingvoj, esp.libroj, gazetoj, bildkartoj.

Kun sveda knabino. **Tomasz Chmielek**, Nadle Swictwow Saidnik, 21-040 SWIDNIK, Pollando.

1. Unueco donas fortecon

2. Al ĉiu frato lian parton

3. Al kokino la ovo lecionojn ne donu

4. Paroloj kaj faroj estas malsamaj aferoj

FÖRLAGSFÖRENINGEN

ESPERANTO

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Adreso: Esperantoförlaget, Fack,
200 42 Malmö 7

Ejo: Möllevångsgatan 20 B

★

Dejortempo 1 sept.—15 majo:

merkredo 10.00—11.00

ĵaŭde 17.00—18.00

Skribaj mendoj ekspedataj dum la tuta jaro.

Tel. 040 / 12 20 29. Postgiro 578-5.

★

Administranto: Anna-Greta Strömne

Tel. hejma 040 / 12 92 11

Prez. Sven Sjöblom

La Espero

Svenska Esperantotidningen

Organ för Sv. Esperantoförbundet,
Fack, 122 04 Stockholm-Enskede.
Hägervägen 31.

Postgirokonto 20 12-3.

Ansvarig utgivare: Bertil Åkerberg.

Redaktör: Åke Blomberg, Lidåkersgatan 6 C, 531 00 Lidköping.

Tel. 0510-286 42 (arb. 0510-221 30).

Medlemsavgift för direkt medl. 25 kr, ungdom 10 kr, familjemedlem utan tidning 5 kr.

Prenumerationspris 20 kr.

Förbundets sekretariat är öppet
onsdagar kl. 18—20, tel. 08-48 99 76.

Sturetryckeriet AB - Stockholm 1974